

EÖTVÖS LORÁND TUDOMÁNYEGYETEM
BÖLCSÉSZETTUDOMÁNYI KAR

MISCELLANEA INTERLINGUISTICA

Interlingvisztikai szöveggyűjtemény
Interlingvistika Antologio – Antologia interlinguistica

Szerkesztette:
Redaktis – Redattore

DR. SZERDAHELYI ISTVÁN

KÉZIRAT

ENHAVO

ENKONDUKO	
Szathmári István, Discours d'ouverture	7
Balázs János, Lingvistiko , interlingvistiko , es- perantologio	11
Szerdahelyi István, La Hungara modelo en interling- vistiko	14
APLIKATA LINGVISTIKO	
Pool, Jonathan, Bazaj ecoj de la lingvopolitiko ..	101
Rátkai Árpád, Fruaj socialismaj konceptoj pri la lingva futuro de la homaro	107
Vercellin, Giorgio, Il problema delle lingue uffici- ciali in Afghanistan	122
Nordio, Mario, Gli "Assiri" di Persia: uno stimolo alla letteratura delle relazioni fra stato e lingua minoritaria	129
Mildonian, Paola, Elementi strutturali e sovrastrut- turali nella formazione del lessico religioso armeno	140
Csillaghy, Andrea, Le minoranze turco-altaiche ...	142
Marzaduri, Marcello, La "zaum"	144
Minnaja, Carlo, Lingvistikaj aplikoj de iuj mate- matikaj teknikoj	161
Ferenczy Gyula, La tradukado kiel lingvistika problemo	170
Saturova, Magda, Vortelektio en dulingvaj traduk- vortaroj	179
INTERLINGVISTIKO	
Jermář, Jaromír, Etnaj problemoj kaj interling- vistiko	185
Zlatnar, Peter, Nacia ŝtato kiel fenomeno de ho- diŝua tergloba socio kaj Internacia Lingvo	192
Rátkai Árpád, Sistemo de la transnacia lingvouzo..	197
Traunmüller Hartmut, Socia bazo kaj komunika efi- keco de interlingvoj.....	205
Reiersøl, Olav, Kriterioj por lingvotaksado en in- terlingvistiko	216
Lamberti, Marcello, Caratteristiche essenziali per una lingua di successo	228

Verloren van Themaat, W.A., La internacia vortaro kaj ĝia signifo por la dezirinda formo de planlingvo	237
Barandovska, Vera, Interlingvistika verko de Komenio	261
Back, Otto, Pri planlingva etimologio	266
ESPERANTOLOGIO	
Golden, Bernard, Bibliografiaj donitaĵoj pri eblaj planlingvaj fontoj de Esperanto	279
Gold, L. David, Towards a Study of Possible Yiddish and Hebrew Influence on Esperanto	300
Corsetti, Renato, Mauro La Torre, Nino Vessella, Pliriĉigo de la morfemaro en Internacia Lingvo	368
Blanke, Detlev, Konfronta lingvistika komparo de etnolingvo kaj planlingvo: kelkaj problemoj de la vortfarado de la germana kaj de Esperanto	380
Pennacchietti, Fabrizio A., Determino per kaj sen artikolo en Esperanto	400
Wacha Balázs, La ag-aspekto en Esperanto	413
Behrmann, Hermann, La lingvo-orientiĝa instruado	423
Berezowska, Joanna-Lewanderska, Alicja U., Eluzo de aktivecaj metodoj en lernado de Esperanto je bazo de lernolibro ĉirkaŭ-dotita kaj didaktikaj ludoj	427
Blázquez, Felix Garcia, La instruado de vortfarado en Esperanto	431
Lienhardt, Albert, Pri la kompleksaj vortoj en Esperanto	445
Golonka, Antoni, Vortgenerilo Esperanta	457
Leyk, Jerzy, Problemoj de la evoluo de Esperanto	458
Waseda Mika, Esperanto: A Living Language	465
P o s t p a r o l o	514

Jonathan Pool*

BAZAJ ECOJ DE LA LINGVOPOLITIKO

I. Difino de lingvopolitiko

Laŭ la kanad-usona politikologo David Easton, la politiko estas "la aŭtoritata disdividiĝado de valorajoj por la tuto de socio". La lingvo-politiko, laŭ tiu difino, estas la aŭtoritata disdividiĝado de lingvaj valorajoj por tuta socio. Kaj kio estas lingvaj valorajoj? Sekvante la kutiman praktikon inter nunaj fakistoj, ni povas menciigi la internajn ecojn de lingvoj kaj iliajn eksterajn rilatojn kun aliaj sociaj objektoj. Ambaŭ povas esti valorajoj. T.e., homoj valorigas ambaŭ aspektojn de lingvoj. Ekzistas klopodoj je ŝtata influo al ambaŭ. Do ekzistas ambaŭspecaj lingvopolitikoj. Oficiala decido ŝanĝi la skribsistemon de lingvo estas ekzemplo de la unua, konflikto pri la elekto de tutŝtata instrulingvo ekzemplo de la dua. La du aspektoj tamen interefikas, do multaj politikaj agadoj estas miksaĵoj.

II. Ecaj variantoj

Por ke ni konstata la bazajn ecojn de la lingvopolitiko, ni devas formuli la demandojn, al kiuj ili estas respondoj. Tio signifas, unue, difini la koncernajn realecniveleojn kaj, due, precizigi la interesajn ecvariantojn. Mi volas demandi pri du niveloj de realeco: la aktuala kaj la eventuala. Kaj mi proponas rigardi tri variantojn:

- (1) la graveco de la lingvopolitiko,
- (2) la stilo de la lingvopolitiko kaj
- (3) la provizoreco de la lingvopolitiko.

III. Aktualaj ecoj

Ni komencu la konsideron ĉe la aktuala nivelo. Kiam oni observas la lingvopolitikon en diversaj tempoj kaj lokoj, ĉu oni trovas ĝin grava? Kia estas la stilo de politikado, kiu kutimas? Kaj ĉu la lingva demando rapide solviĝas aŭ persistas?

*Universitato de Washington

A. Graveco

Regas malharmonio inter la fakistoj pri la unua demando. Pluraj trovas la lingvan demandon tre grava, se ĝi entute ekzistas. Inter studentoj pri Hindujo, ekzemple, Selig Harrison en la 1960aj jaroj vidis la lingvon kiel la ĉefan politikan problemon kaj kredis, ke ĝi facile povos kaŭzi la disrompiĝon de la lando mem. En la fruaj 1970oj, Jyotirindra Das Gupta trovis la lingvopolitikon granda edukilo por grupiĝo, politika kunagado kaj, sekve, demokrata praktiko en Hindujo. Kvankam ili malkonsentis pri la efiko, ili ambaŭ opiniis la efikon tre grava. Komparante ĉirkaŭ 15 landojn, Rabushka kaj Shepsle antaŭ kelkaj jaroj trovis, ke novaj ŝtatoj ĝenerale traktas lingvajn dividojn kiel fundamentajn, i.a. ĉar ili laŭas aliajn dividojn. Kie unu divido konstante fiksa la bordon inter la politikaj flankoj senkonsidere pri la demando, la politiko ekstremaĝadas kaj la lando aŭ splitiĝas aŭ subiras diktatoron, laŭ ilia analizo.

Aliaj tamen argumentas, ke la lingvopolitiko esence malgravas. Karl Heinz Pfeffer, en La Monda Lingvo-Problemo antaŭ kelkaj jaroj, diris, ke la lingva disputo en la tiama Pakistano estas esence socia, ne lingva. Donald L. Horowitz konkludis el kompara studo, ke elitoj en novaj multetnaj ŝtatoj ĝenerale atentis ekonomiajn konsiderojn multe pli ol lingvajn kaj aliajn kulturajn problemojn, kiujn ili do manipulas por pliplenigi siajn poŝojn.

Tiu lasta opinio pli maloftas kaj laŭ mi subtaksas la gravecon de lingvaj konfliktoj. Eĉ kie homoj ne sentas lingvajn decidojn fundamentajn, tiuj tamen grandskale efikas amasajn edukkondiĉojn, profesiajn ŝancojn kaj eblecojn de politika agado, kaj la vivdaŭron de etnoj, en plurlingvaj landoj. Sed oni multloke ja komprenas tiun gravecon. La lingva demando evidente ludas grandan rolon en la politikoj de Kanado, Jugoslavio, Belgujo, Hindujo, Sudafriko, Ĉinujo kaj aliaj landoj. En pluraj landoj, kies elitoj kredis, ke ili jam solvis siajn lingvajn problemojn, ekzemple Usono, Sovetunio, Francujo kaj Britujo, la problemoj persiste reaperas kaj ŝajne pligraviĝas. Kaj en landoj, kies elitoj longe ignoris siajn lingvajn dividojn, oni komencas adopti lingvopolitikojn, ekzemple kun-oficialigante indianajn lingvojn en pluraj latinamerikaj ŝtatoj. Estus, do, ĝuste, konsenti kun Karl W. Deutsch, kiu jam en la 1960aj jaroj deklaris, ke lingvaj postuloj kreskas en la politikaj ĝardenoj de la hodiaŭa mondo "fungorapide".

B. Stilo

Pri la stilo de la lingvopolitiko estas pli da konsento. La lingvopolitiko estas, preskaŭ ĉie, politikeca. David Laitin, ekzemple, montris en nova libro, ke dum 19 jaroj la favorantoj de la 13 diversaj alfabetoj por la somalia lingvo tiel akre interbatalis, ke ili paralizis la lingvopolitikon ĝenerale, tiel ke oni ne sukcesis eĉ adopti la somalian kiel la oficialan lingvon de Somalio, malgraŭ la fakto, ke ĝi denaskas ĉe 95% de la loĝantaro. En nuntempa Usono okazas vigla debato pri la rajtoj de homoj, kiuj ne scipovas la anglan. La debato montras ĝeneralan malvolon konsideri la lingvan problemon ekster la kadro de la jam regantaj stereotipoj pri rasoj, etnoj kaj lingvoj. Do la leĝo pri dulingva instruado malpermesas, ke oni uzu la tiucelan monon por apartigi alilingvanojn de anglalingvanoj sed ankaŭ ke oni uzu ĝin por instrui aliajn lingvojn al anglalingvanoj neta sinmaligo. La soveta seĉato pri la lingvopolitiko estas pli detala sed simile politikeca anstataŭ teknikeca. La samaj aŭtoroj citas kontraŭajn ĝenerajn principojn, ekzemple la aktivismon kaj la volontismon, por defendi kontraŭajn lingvopolitikajn direktojn. La lingvopolitiko de Ĉinujo ŝajnas sufiĉe ofte inversiĝi aŭ ŝanĝiĝi laŭ la ĝeneralaj politikaj emoj kaj, simile al multaj aliaj landoj, la oficiala difino pri kiuj variaĵoj estas lingvoj kaj kiuj estas dialektoj sekvas politikajn, ne lingvikajn, konsiderojn. En Kanado, la franca lingvo jam de jarcentoj aperas al iuj kiel ŝlosilo al la etna ekzisto kaj al aliaj kiel trudo. La politikoj por dulingvigi la kanadan ŝtat-postenularon kaj por unulingvigi Kebekion estas deklaroj kaj agoj, kiuj respondas al diversgrupaj insistoj. Ili ne estas, tamen, zorge detaligitaj planoj bazitaj sur antaŭesplorado.

C. Provizoreco

Lingvaj problemoj ĝenerale daŭras longe, se ili iam ekestas seriozaj. La konfliktoj povas malaperi kaj reaperi, sed la lingva situacio, kiu probablighas konfliktojn, ne facile aŭ rapide ŝanĝeblas. Ofta sinsekvo estas, ke potenca lingvanaro unue venkintigas sian lingvon sed poste suferas ĉe la gajnoj de la antaŭe malsupra grupo. La lingva demando povas tiam regraviĝi. La situacio en Belgujo estas konata ekzemplo. Kaj mi jam menciis, ke lingvaj plendoj foje reaperas multajn jarojn post kiam oni kredis, ke oni forigis la tutan problemon.

Aktuale, do, mi argumentas por la relativa ofteco, eĉ se ne universaleco, de la jenaj bazaj ecoj de la lingvopolitiko:

- (1) graveco,
- (2) politikeco kaj
- (3) obstineco.

IV. Eventualaj ecoj

Transiru ni nun al la demando pri la ecoj ne aktualaj, sed eventualaj, de la lingvopolitiko. Ĉu la lingvopolitiko devas esti tia, kia ĝi fakte estas? Estas klare, ke ni ne plene scias la eventualajn limojn de la lingvopolitiko, sed mi tamen kuraĝas proponi provizorajn konkludojn.

A. Graveco

Unue, la lingvopolitiko estas ne nur hazarde grava, sed esence tia. Ofte eĉ okazas, ke lingvajn demandojn oni ne levas, malgraŭ la objektivaj sekvoj de la lingva situacio. Mi povas citi la strangan ekzemplon de la Unua Internacia Konferenco pri la Metodologio de Socilingvikaj Enketoj, okazigita en 1975 en la dulingva urbo Montreal per helpo ĉefe de la Fonduso Ford. La organizantoj, eminentaj socilingvistoj, eĉ ne demandis, ĉu ili sekvu alian principon, ol adopti la anglan kiel solan oficialan kaj laboran lingvon. La plej grava katalana socilingvisto ne povis ĉeesti la konferencon pro tiu decido, sed la ĉefuloj parolis pri lia foresto kiel bedaŭrindaĵo anstataŭ kiel la rezulto de ilia lingvopolitika decido. Ne surprizas, do, ke ordinaraj politikistoj, kiuj ne fakistas pri la socilingviko, tra la jarcentoj ofte malvidas lingvajn problemojn.

La ebleco malvidi ilin tamen malaperadas, ĉar la kreskanta kunagado de la popolaj amasoj en la eduko, la ekonomia interŝanĝo, la intelekta vivo kaj la politiko igas lingvajn decidojn ĉiam pli sekvhavaj, kaj ĉar la doktrino pri la fundamenta egaleco de ĉiuj homaj lingvoj iom post iom iĝas konscia ilo de etnolingvaj movadoj en landoj de ĉiaj socipolitikaj reĝimoj. Unu skolo eĉ prognozadas disfloron de lingvopolitikaj disputoj, ĉar estas ĝuste la t.n. post-industria homtipo, kiu remalkovras sian etnan kiucon, kiam liaj materiaj bezonoj kontentigitas.

B. Stilo

Kvankam ekzistas bonaj argumentoj por la esenca graveco de la lingvopolitiko, ne necesas, laŭ mia analizo, ke la lingvopolitiko daŭre kondukatu per la jam indikita politikeca stilo. La emociaj ligoj de lingvoj certe ne

malaperos, do la bazo por emocieca, simboleca lingvopolitiko restados. Lingvoj estas tamen ankaŭ komunikiloj kaj la elekto inter ili havas ekonomiajn efikojn unuopajn kaj arajn. Tial oni povas imagi ankaŭ alian, teknikecan aŭ planecan specon de la lingvopolitiko. La ĉefa obstaklo ĝis nun kontraŭ tio estas la manko de taŭgaj teorioj kaj modeloj pri la planado de lingvaj procezoj. La fakistaro pri lingvoplanado, inter ili la interlingvistaro, tamen kreskas kaj jam post kelkaj jaroj povos proponi almenaŭ iujn el la necesaj iloj por tiuj, kiuj volas, ĉu je landa ĉu je interlanda nivelo, aliri la lingvoproblemaron planece.

Unu provo en tiu direkto estas simplaj matematikaj modeloj pri la optima solvo al lingva diverseco, kiujn mi nun ellaboras por prezento aliloke. Per sufiĉa simpligo de la supozoj en la modelo, eblas plene analizi la decidproblemon de agantoj en plurlingvaj situacioj. Oni povas do kalkuli, ĉu estas racie optimumige, ke A lernu la lingvon de B, ke B lernu la lingvon de A, ke ambaŭ lernu iun trian lingvon, ke ili uzu la servojn de tradukistoj aŭ interpretistoj, ke ili adoptu iun miksaĵon de lingvolerna kaj tradukiga solvoj aŭ ke ili rezignu pri interkomunikado. Evidente mankas la ebleco, ĉi tie prezenti la kernajn modelojn, sed la ekzisto de sufiĉe riĉaj precizaj modeloj povas krei la bazon por racieca stilo en iuj lingvopolitikaj situacioj.

C. Provizoreco

Ĉu politikeca, ĉu teknikeca, la lingvopolitiko restos inter ni. Estas grave, rigardi lingvopolitikajn decidojn ne kiel unufojajn finitaĵojn, sed kiel daŭrajn procezojn. Oni ja ofte vidas la malan aserton. La redaktoro de la Jurnalo New York Times skribis, ke la lingvolukto en Usono jam finiĝis per la venko de la angla, do la celo de la dulingva edukado devas esti angligi la minoritatojn. Asertojn pri la baza deciditeco de la lingva demando oni ofte trovas ankaŭ en la tiutema literaturo soveta. Sed lingvaj situacioj daŭre ŝanĝigas, grandparte pro fortoj ne tute manipuleblaj de la politikaj decidantoj, ekzemple la naskofteco kaj la migrado. Diri, ke la lingvoproblemo estas unufoje por ĉiam findecidita malagnoskas tion kaj certe kontribuas al la politikeca snatataŭ racieca stilo de lingvopolitiko.

V. Konkludo

Ŝajnas klare, ke ni transiras dum la nuna jardeko la sojlon al nova epoko en la lingvopolitiko-epoko, kiam la

sistemeca interveno en lingvajn procezojn estos ne nur ideo sed ankaŭ fareblaĵo, epoko, kiam ni havos la ilaron por racia strebado al la lingvopolitikaj celoj, kiujn ni decidis sekvi. Antaŭ tri jaroj, kiam mi havis la privilegion, referaĵi ĉe la Instituto pri Lingviko de la Soveta Akademio de Sciencoj, d-ro M.I. Isaev enkondukis per la ideo, ke la soveta lingvoplanologaro nun transiras de periodo de varbado kaj instigado al periodo de teoria konstruado. Tiu ideo de Isaev validas por la lingvoplana fako ne nur de tiu lando sed tutmonde. La Unua Internacia Interlingvistika Konferenco estas parto de tiu transiro, post kiu ni ne nur analize postsekvos la lingvopolitikon sed eventuale ebligos novan lingvopolitikan stilon kun novaj rezultoj.

Rátkai Árpád*

FRAJ SOCIALISMAJ KONCEPTOJ PRI LA LINGVA FUTURO DE LA HOMARO

En la Novepoko - stimulate de la grandaj geografiaj malkovroj kaj la estiĝo de la mondmerkato - ĉe multaj pensuloj aperis la demando pri la lingva evoluo, pri la lingva futuro de la homaro. Ni klopodas trarigardi: kio estis la koncepto de la utopia, la etburĝa kaj la naskiĝanta scienca socialismo pri la estonta homara lingvouzo?

La 17-jarcenta filozofia koncepto pri raciismo enkondukis la nocion Universala Lingvo. La Universala Lingvo signifas la lingvon de la lingve unueca homaro. Sed la ĉefa celo de la raciistoj estis prilaboro de perfekta filozofia sistemo, la Universala Lingvo devintus aperi nur kiel kromproduktaĵo. Kiel sur filozofia fundamento konstruenda, perfekta, racia, facile ellernebla lingvo ĝi devintus esti kvazaŭ logika ŝlosilo por la pensado. (Vidu: DREZEN¹, KNOWLSON² kaj KELEMEN³).

Ankaŭ ĉe socialismaj teoristoj aperis la Universala Lingvo nur kiel akcesoraĵo. La utopiistoj ne perfektan filozofian sistemon, sed perfektan socion klopodis prikribi, la Universala Lingvo aperis nur kiel problemero de la liberigo de la tuta homaro.

La renesancaj utopiistoj

Dum la disfalo de la feŭda kaj naskiĝo de la burĝa sociordo la renesancaj utopiistoj klopodis prilabori la bazajn principojn, eĉ multajn detalojn de la ideala sociordo. Ilia celo estis kreo de nova, justa, sensociklasa sociordo baziĝanta sur la socia egaleco. Inter naŭvaj kaj senbazaj supozoj ili ne malofte genie suspektis kelkajn karakterizajn trajtojn de la estonta komunisma socio.

Neeviteble aperis ĉe ili ankaŭ tiu penso, ke la lingva dividiteco en tiu sensociklasa homaro devos malaperi, kaj la rezulto de la evoluo devos esti la lingva unueco de la homaro. Tri elstaraj reprezentantoj de la renesanca utopiismo laŭvice pli kaj pli alfrontis tiun problemon en la jaroj 1516, 1602 kaj 1677-1679.

*MSZMP Csongrád megyei Bizottság Oktatási Igazgatósága